## Divido de respondecoj kaj taskoj inter ILEI kaj invitanto/LKK de ILEI-kongreso

La Konferenca regularo (http://www.ilei.info/dok/Konferenca_regularo.pdf) kaj spertoj el multjara praktiko de konferencoj kaj kongresoj de ILEI difinas respondecojn kaj taskojn de ILEI unuflanke, kaj la invitanto kaj Loka Kongresa Komitato (LKK, kiu en la *Konferenca regularo* estas nomata Konferenca Estraro) aliflanke. La taskodivido ne estas tute strikta, sed kunlabora plenumado ĉefrolas, tamen la respondecoj devas esti klaraj. ILEI ĉefe respondecas pri la tuta organizo kaj financo de la evento, kaj la invitanto / LKK pri la loĝistiko. La principa sed ne nepre ekskluziva taskodivido estas jena:

*ILEI*:

- organizo, realigo, financo;
- programo ĝenerale, kaj speciale organizaj, fakaj kaj klerigaj programeroj;
- komunikado kaj eksteraj rilatoj en la internacia medio;
- aliĝilo, mendiloj, komunikado kun interesiĝantoj kaj aliĝintoj pri partopren- kaj aliĝ-kondiĉoj, kontribuproponoj por la kongresa programo, partopreno en specifaj programeroj k.s.
- enhavo de la Kongresa libro.

*Invitanto / LKK*:

- loĝistiko (kongresejo, kancelariaĵoj, kongresa sako, presado de la Kongresa Libro, kontaktoj kun lokaj universitatoj por la simpozio pri kongresa temo, spacoj por la lingva festivalo, spaco kaj deĵoranto por la libroservo);
- akceptejo kaj kongresaj servoj (loĝiga servo, manĝado, ekskursoj k.c.);
- komunikado kun interesiĝantoj kaj aliĝintoj pri lokaj kondiĉoj, kiel atingi la kongresejon kaj loĝejon, kongresaj servoj k.s.
- kultura, turisma kaj distra programo;
- komunikado kaj eksteraj rilatoj en la loka medio;

### Pli detale pri kelkaj punktoj

1. La invitanto proponas **lokon, datojn kaj kongresejon**, kaj povas proponi la kongresan temon kaj specifajn temojn kaj programerojn interesajn kaj gravajn por la loka E-movado. Decidas la Estraro de ILEI, kiu ankaŭ decidas pri la kotizoj kaj aliĝkondiĉoj, kaj aprobas la buĝeton kaj programskemon.

2. La Regularo diras:

   ***Administrado***
   *9. Principe la ĉefa administrado kaj librotenado de ILEI-Konferenco estas prizorgata de la Kasisto de ILEI. Al tiu oni sendas la aliĝojn kaj mendilojn kaj principe ankaŭ ĉiujn pagojn.*

   Tiel principe. En la praktiko oni serĉas plifaciligajn solvojn. Ekzemple, ĉiuj enlandaj pagoj – kotizoj, mendoj, subvencioj – iras al la kongresa konto de LKK, el kiu pageblas antaŭ- kaj dum-kongresaj aĉetoj kaj servoj, ĉio enkadre de la kongresa buĝeto aprobita de la Estraro de ILEI. Se la enlanda enspezo ne sufiĉas por la kurantaj bezonoj, la kasisto de ILEI povas ĝiri el ILEI-konto al enlanda konto de la kongreso aprobeblan bezonatan sumon. Estas afero de bona komunikado inter la du kasistoj – de ILEI kaj de LKK.

3. **La kulturan programon** (muzikan, teatran, literaturan k.c.) ILEI kaj LKK solvas kunlabore, interkonsente. La ILEI-kongreso estas malaltbuĝeta aranĝo, kiu povas elspezi por la kultura programo unuavice el tiucelaj eventualaj subvencioj. Sekve tiu programparto ĉefe konsistas el

kion LKK preparas (ekz. muzika kontribuo al la solena inaŭguro, nacia vespero, dancvespero, eble aliaj distraj programeroj, adiaŭa vespero, ...) kaj kion kontibuas kongresanoj mem por prezenti siajn kulturojn (interkona frandvespero, lingva festivalo, internacia vespero, literatura kafejo, dancvespero, ...).

4. LKK proponas **ekskursojn**, priskribas intinerojn kaj komunikas al la estraranoj pri kongresoj kaj financoj (kasisto) la efektivajn kostojn, kiom ILEI devas pagi al servodonantoj por la ekskursoj. ILEI difinas la prezojn (kiom ekskursanoj devos pagi al ILEI), anoncas la mendilon, varbas (ankaŭ LKK varbas tra siaj kanaloj), kolektas la mendojn kaj pagojn sammaniere kiel la aliĝilojn kaj kotizpagojn (punkto 9 de la Konferenca regularo). LKK-ano pri ekskursoj sekvas la mendojn, formas ekskurslistojn, preparas ekskurskuponojn por ĉiu ekskursano, kunordigas la realigon. Do LKK prizorgas realigon de la ekskursoj inkluzive de esperantistaj ĉiĉeronoj, aŭ ĉiĉeron-interpretado. Ĉio ĉi realiĝas konforme al la Konferenca regularo:

   *5. [....] Per aparta kontrakto inter ILEI kaj lokaj instancoj oni reguligas ankaŭ diversajn aliajn aspektojn de la konferenca organizado plenumotajn de aparta Konferenca Estraro (legu: LKK, rim. RP) el minimume tri personoj elektota en la unua kunsido: konferencejo, loĝado, ekskursoj, ktp. Tiujn kontraktojn ellaboras kaj nome de ILEI subskribas la Kasisto.*

5. Por **loĝado de kongresanoj kaj manĝado** LKK enketas kaj proponas hotelojn kaj aliajn loĝeblojn kaj manĝeblojn, prefere sed ne nepre en la sama konstruaĵo kun la kongresejo, negocas pri la prezoj kaj kondiĉoj, kaj preparas kontraktojn, kiujn principe subskribas la kasisto de ILEI. Plua procedo estas sama kiel por ekskursoj. Same pri **bankedo**.

6. Por la **akcepto de kongresanoj**, LKK ricevas de ILEI, aŭ kunmetas kunlabore kun la estraranoj pri kongresdoj kaj financoj, liston de aliĝintoj kun indikitaj kotizpagoj kaj kotizŝuldoj, kaj mendolistojn por kongresaj servoj, kaj disponigas ilin al deĵorantoj ĉe la kongresa akceptejo. La deĵprantoj akceptas alvenintojn, kontrolas la pagojn kaj pagigas eventualajn ŝuldojn (inkluzive de novaj aliĝantoj, kiuj aliĝas, mendas servojn kaj pagas surloke), registras la partoprenon kaj transdonas al la registrito kongresan sakon kaj kongresajn dokumentojn.

**Pri kelkaj specifaj programeroj**

7. **Interkona frandvespero**
   Ĝi estas la unua kunveno de alvenintaj kongresanoj por interkonatiĝo, garnita per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kiujn la kongresanoj portas el siaj landoj kiel specialaĵojn de la diversaj kuirartoj. ILEI popularigas ĉi tiun programeron inter la aliĝintoj. LKK aranĝas la necesan spacon kaj certigas sufiĉan kontribuon de la loka gastronomio.

8. **Nacia vespero**
   Ĝi okazas kutime vesperon de la dua kongresa tago. Per ĝi la kongreslando kaj kongresurbo prezentas sin kaj sian kulturon. LKK prizorgas ĝin.

9. **Internacia vespero**
   La programo de Internacia vespero konsistas el kontribuoj de kongresanoj: muzikaĵoj, dancoj, deklamaĵoj, rakontoj, skeĉoj, ludoj k.s. ILEI kaj LKK interkonsente nomumas reĝisoron de la Internacia vespero.

10. **Kongresa bankedo**
    Ĝi kutime okazas vesperon de la simpozia tago en iu nacia restoracio spegulanta la nacian kulturon de la kongresurbo, kiun proponas LKK. Kongresanoj kiuj volas partopreni ĝin aparte pagas. Por kongresanoj kiuj ne volas partopreni la bankedon kutime okazas paralela prgramo malpli kosta aŭ senkosta.

11. **Lingva festivalo**
La kongreso arigas homojn el ĉiuj mondopartoj, el diversaj kulturoj kaj lingvokomunumoj. Lingva festivalo (LF), dum kiu 20-30 kongresanoj prezentas siajn lingvojn per duonhoraj "lecionoj", renkontigas la kongresanojn kaj lokan neesperantistan publikon kun la lingva kaj kultura diverseco de la mondo, kutime dum unu el kongresaj posttagmezoj, dum kiu ne okazas aliaj programeroj. Ĝi estas plia travivaĵo por la kongresanoj, sed ankaŭ povas, se adekvate planita kaj anoncita, plivideblIgi la kongreson kaj Esperanton en la loka medio kaj amaskomunikiloj. ILEI varbas lingvoprezentantojn inter la aliĝintoj. LKK aranĝas la spacon por LF kaj informas la lokan publikon pri ĝi.

12. **Simpozio pri la kongresa temo**
La ILEI-kongresa simpozio estas inkluziva por esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj pri la kongresa temo. Ĝi celas, interalie, konsciigon de homoj el la eksteresperantuja akademia medio pri Esperanto kaj ĝiaj valoroj. ILEI kaj invitanto kunlabore nomumas Programkomitaton, kiu prizorgas la organizan kaj enhavan aspektojn de la simpozio kunlabore kun LKK kaj ILEI-estrarano pri kongresoj.

13. **Infana universitato**
Infana universitato dum la kongreso de ILEI celas kovri vastan gamon da edukaj, klerigaj, kultur-artaj, sportaj, ludaj kaj vartaj bezonoj de la infanaĝa E-publiko ebligante kunestadon de la gepatroj kun la infanoj kaj ilian tempodisponon por partopreno en elektitaj neinfanaj programeroj. Ĝi povas akcepti ankaŭ instruistojn kun grupoj de infanaĝaj E-kursanoj sen aŭ kun la gepatroj aŭ parencoj. La gepatroj kaj infangrupgvidantoj povas solidare dividi la taskojn de prizorgo kaj programa gvidado de la infanoj laŭ interkonsentita tempoplano. Dum unuj deĵoras kun la infanoj kaj gvidas ilin tra la kongresa tempospaco, la aliaj ĝuas la kongresan programon, poste  la roloj alterne ŝanĝiĝas. LKK kaj ILEI kunlabore taksas la eblecon organizi ĝin.

14. **Pedagogia foiro**
Ĝi konsistas el ekspozicio kaj prelegoj pri E-pedagogiaj produktoj kaj servoj (lernoliboj, kursoj, kursejoj, lernhelpiloj k.c). Preparas ĝin kunlabore ILEI kaj LKK.

15. **Literatura kafejo**
Ĝi povas okazi en vespera aŭ nokta programo, ĉiutage aŭ en elketitaj tagoj po 1 ĝis 2 horoj, por komuna legado kaj analizo de elektitaj literaturaj pecoj, ĉu originalaj, ĉu tradukitaj el etnaj literaturoj laŭ proponoj de partoprenantoj. ILEi kaj LKK interkonsentas kie kaj kiel aranĝi ĝin.

Radojica Petrović
Estrarano pri kongresoj, ILEI